# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 21/03/2024 sescentsepdeknaŭa eldono (unua eldono 26/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

Ne estas facîla elekti el al ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

KIEL FASTADO EFIKAS AL LA KORPO 14 DE MARTO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 16a de marto estis la tria sabato.

Venis Roger, Chris, John. 02 9976 6320 *Roger Springer*

Manly Observer
FREE. FRANK. FAIR

La morto de 46 grandaj fiŝoj de Roger
Sad loss for Manly identity after pond mishap - Manly Observer
(en la angla, belaj bildoj) *Roger Springer*

A Current Affair Season 2024 9NOW *io pli sed malsama*

https://www.9now.com.au/a-current-affair/season-2024/episode-55 ekde 14.40minutoj



Karaj legantoj,
mi legas, ke "La 7-an de marto la sudaŭstralianoj renkontiĝis zoom-e."
Antaŭ kelkaj tagoj mi kun amiko diskutis, kiel ni nomu tiun renkontiĝmanieron.
"Zumi" estas fari sonon kiel ekzemple abelo. "Zomi" laŭ PIV ankaŭ jam havas 3 signifojn.
Ĉu do ni renkontiĝas "zoome"? Ĉu tiam ni devos prononci ambaŭ "o"-ojn? Kiel en "zoologia ĝardeno?
Mi antaŭĝojas legi viajn komentojn. Amike, *Peter Weide*



# Invito al komuna legado kaj luktado

En la 10-a de marto, komenciĝis la 86-a Internacia Esperanto-Sumoo. Dum du semajnoj ni, la partoprenantoj, ĉiun tagon legas la libron, kiun ni elektis, kaj kvanton da paĝoj, kiun ni mem decidis, kun 300 esperantistoj tra la mondo. En la solidara sento ni povas ĝui legadon de Esperanto-libroj. Tiu sumoo estas la plej granda leg-movado en la homa historio, danke al Esperanto kaj interreto. Mi atendas vian partoprenon. Pli detale vizitu nian retejon: http://www.esperanto-sumoo.pl/



**HORI Jasuo,**Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp Sendis al AE *Katja Steele*

# Cele ŝpari kelkajn minutojn.....

Jam antaŭ ses aŭ ok jaroj, *Vicroads* konatigis sian deziron plibonigi la trafikon tra la urbeto Montrose. Kontraŭ la malapero de ĉiuj arboj, ĉu en la mezo ĉu sur la flankoj de la vojo, la aŭtomobilistoj gajnos pliajn koridorojn kaj modernan rondiron, do povos pli rapide atingi sian laborlokon matene kaj sian hejmon vespere. Tiam kreiĝis grupo por kontraŭstari la projekton: la damaĝoj estos tro grandaj kompare kun la plibonigo. De tempo al tempo revenis la ideo, sed pro la silento dum kaj tuj post la pandemio, plejparto de la loĝantoj opiniis ke la projekto neniam estos realigita. Gravaj konstruadoj por publikaj transportoj al la flughaveno jam ekis, la prezo konstante altiĝas, necesas ŝpari monon, do kelkaj projektoj devus esti nuligitaj …… Neatendite venis la anonco ke de la komenco de ĉi tiu monato ĝis malfrue en 2025 oni konstruos la planitan rondiron. Dum la laboristoj hakas la arbojn, ne eblas iri pli rapide ol 10-15km/hore. Aparato registras la rapidecon de ĉiu veturanto kaj sendas luman mesaĝon " *Well done*" ( bone farite), ĉu por ĝojigi ilin?

Persone mi preferas komforton al rapideco. Mi antaŭvidas ke post la sunleviĝo je unu direkto kaj antaŭ la sunsubiro je la alia ne plu estos protektado kontraŭ la blindiga suno aŭ nokte kontraŭ la fortaj lumoj de la kontraŭaj aŭtomobiloj. Estas sciate ke verdaĵo gravas por la bonfarto de homoj. Kial forpreni la kamparan aspekton de tiu loko por anstataŭi ĝin per tute artefarita vidaĵo?

La decidantoj kredigas nin ke nia vidpunkto gravas, organizas renkontojn kaj diskutojn kaj finfine ignoras tiujn etapojn . *Franciska Toubale*







## Tiu arbo vivas siajn lastajn tagojn



## 3ZZZ

La elsendo de la 18a de marto enhavas informojn pri la movado: decidoj de la akademio, prezentado de Julia isbrücker, de George Soros kaj lia rilato kun Esperanto ; kaj se vi vojaĝas al Vieno nepre vizitu la Vieno-muzeon .

*Franciska Toubale*



# Kelkaj ideoj de Bob Felby

Kara amiko Roger!

Tio, kion ni bezonas estas ja pli da bonaj, pardonu bonkoraj homoj. Homoj devas ja lerni pardoni unu la aliajn ĉu ne?

Homoj ofte, fakte tro ofte, eraras. Fakte la plej elstaraj homoj el ĉiuj, povas erari. Kiel oni diras "erari estas homa", ĉu ne?

Mi legis en unu el viaj artikoloj, ke patrinoj kuraĝigas buĉistojn, kruele mortigi tute sendependajn bestojn kaj tiam manĝigi la kadavrojn al siaj infanoj. Nu, tio certe ne plaĉas al mi. Neniuj el ni estas metitaj sur la Teron por manĝigi aliajn. Kadavromanĝado estas ja primitiva manĝado.

Same pri niaj politikistoj, ĉu ne? Mi ne scias ĉu ili agas pro tedeco, sed ŝajnas ke unu el iliaj ŝatokupoj estas ataki siajn najbarajn landojn, certe ne per si mem, sed per tute senkulpaj soldatoj kiujn ili devigas iri en siajn najbarajn landojn kaj bombardi malsanulejojn, lernejojn, fifabrikaĉojn ktp. ktp. ktp. Ili sendube kredas ke ili faras bonon per tio! Mi certas, ke ili faras nur malbonon per tio. Eble oni devus devigi ĉiujn politikistojn mem surmeti sangokovritajn fiuniformaĉojn kaj tiel instrui ilin pri iliaj eraroj!

Ne nur bestoj, sed certe ankaŭ homoj estas metitaj sur la Teron por ke ili lernu! La bestoj devas iom post iom lerni kiel fariĝi homoj, homoj kiuj ne mortigas, ĉar mortigado estas krimo! Patrinoj ne rajtas manĝigi siajn infanojn per bestaj kadavroj. Ni ĉiuj devas lerni konduti bone, ĉu ne? Mortigado kaj detruado estas teruraj krimoj, kiuj estas punataj, neniu dubo pri tio.

Nun Zamenhof donacis al ni ĉiuj la plej bonegan lingvon per kiu ni ĉiuj povas interamikiĝi kaj vivi kune kiel decaj homoj, ĉu ne? Kion vi nun opinias? Ĉu vi ne ĝojas! Zamenhof tute senpage donacis al la homaro sian majstran lingvon.

Mi havas tre fidelan hundon. Ĝia nomo estas *Sammy*. Li antaŭ nelonge decidis ŝanĝi sian nomon al *Sammy Hof*.

Ĉu mi bezonas diri ke la loka esperantistaro kie ni loĝas treege fieras ke inter ni nun vivas tre bonega samideano kun la nomo de *Samenhof*!

Tiuj estis la vortoj! *Bob Felby*

Kiam ajn ni ricevas novaĵraporton, ni faru du demandojn al ni mem

1. Ĉu vere? Kaj 2. Kiu profitas? *Roger Springer*